

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

1992:4/5



*En ĉi tiu numero vi povas legi pri la UK en Vieno, al kiu rekordaj 3033 kongresanoj aliĝis; pri la unua landa kongreso de la esperantistoj en Tanzanio; kaj pri nia avangarda poeto Jarlo. Enestas ankaŭ granda recenzo pri la nova sveda-esperanta vortaro.*



## La Espero

Organ för  
Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694  
Septembro 1992 • 80-a jarkolekto  
Fondita en 1913

**Redaktör:** Leif Nordenstorm,  
Björknäsvägen 3 C, 961 34 Boden,  
tel. 0921 - 123 54

**Frågor om prenumeration o.dyl.:**  
Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21,  
111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Sättning:** Leif Nordenstorm, Per Aarne  
Fritzon

**Utformning:** Omnibus, Tyresö

**Tryck:** Quintus, Sollentuna 1992

**Prenumeration:** 135 kr. Gåvoprenume-  
ration till utlandet: 75 kr.  
Prenumerationsavgift för *La Espero*  
ingår i medlemsavgiften. Postgiro  
20 12-3, Esperantoförbundet.

## Esperantoförbundet

**Adress:** Esperanto-Centro,  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,  
tel. 08-11 74 34, fax: 08-20 72 20

**Öppettider:** Vintertid alla vardagar, men  
säkrast måndag och torsdag  
kl. 11-13 och 17.30-19.

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 1992:**  
Direktansluten medlem 135 kr.  
Familjemedlem (utan tidning) 60 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr.  
Medlemmar under 30 år är samtidigt  
medlemmar i Sveriges Esperantisters  
Ungdomsförbund och får dess tidning  
*Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela  
ditt födelseår till EsperantoCentro.

## Esperantoförlaget

**Postadress:** Box 7502, 200 42 Malmö

**Besöksadress:** Möllevångsgatan 20B,  
Malmö

**Telefon:** 040-12 20 29

**Postgiro:** 578-5

**Telefontid:** 1 september-15 maj; torsda-  
gar kl. 17-18. Skriftliga beställningar  
expedieras under hela året.

**Expedition:** Wivi Nilsson

**Styrelsens ordförande:** Tomas Jansson,  
Storgatan 13, 753 31 Uppsala



## SEF:s styrelse

**Ordförande:** Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Handen,  
tel. 08-777 41 75

**Vice ordförande:** Kaisa Hansen, Hammarbyvägen 56, 194 36 Upplands Väsby,  
tel. 08-590 88 210

**Sekreterare:** Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,  
tel. 08-712 82 91

**Kassör:** Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde,  
tel. 0500-122 05

**Styrelseledamot:** Bertil Andreasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby,  
tel. 0415-501 52

**Styrelseledamot:** Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping,  
tel. 011-17 36 87

**Styrelseledamot:** Per Aarne Fritzon, Västertorpsvägen 154, 126 59 Hägersten,  
tel. 08-97 47 76

**Suppleant:** Leif Nordenstorm, Björknäsvägen 3 C, 961 34 Boden,  
tel. 0921-123 54

**Suppleant:** Agneta Emmanuelsson, Carl Ugglas väg 6, 641 37 Katrineholm,  
tel. 0150-523 87

## ANONCETOJ

### Internacia Societo de Invalidaj

**Esperantistoj** volas havi  
kontakton kun handikapuloj kaj  
aliaj interesitoj: Konkordo, Brivibas  
27-11, LAT-229910 Ventspils,  
Latvio.

**En skrift om EG, mångspråkig-  
heten och esperanto** på 39 sidor  
i A4-format kan beställas genom att  
20 kr + 10 kr för porto betalas till  
Svenska Esperanto-Institutet,  
postgiro 5 15 11-4.

**I La Espero 2/1992** berättade vi hur  
man kan begära automatisk över-  
föring från sitt eget bankkonto till  
Esperantoförbundet. Tyvärr har det  
visat sig att det inte går att begära  
automatisk överföring till Esperan-  
toförbundets konto på Handels-  
banken, eftersom detta är en bank-  
bok. Både avsändarkontot och  
mottagarkontot måste vara mot-  
bokslösa. Däremot går det bra att  
begära automatisk överföring till  
Svenska Esperantoförbundets  
postgirokonto 20 12-3.

**Ni volas vendi inform-serĉantan  
komputilan programon.** Ĉu vi  
volas fariĝi sveda revendisto?  
Minska esperantisto pri informad-  
iko, str. Kalinovskogo 46-59,  
220086 Minsk, Belorusio.

**29 decembro-5 januaro 1993  
okazos Internacia Esperantista  
Renkontiĝo en** Jekaterinburg.  
Informoj: Ruslanda Esperanto-  
Asocio, pk 67, RUS-620077

Jekaterinburg-77, Rusio.  
**Gelernantoj 13-16-jaraĝaj** volas  
korespondi kun gelernantoj en  
Svedio. Ili kolektas poŝtmarkojn,  
bildkartojn k.t.p.: Esperantoklubo  
"Juneco", Mezlernejo, LT-234500  
Kozlu Ruda, Litovio.

**Deziras vendi suvenirojn, poŝt-  
markojn k.t.p.:** Aleksandr  
Trubarev, Peĉora 7, A/Ja-15, RUS-  
169700 Respublika Komi, Rusio.

**Por korespondi kun koreaj  
esperantistoj,** turnu vin al Seula  
Esperanto-Kulturcentro, CPO Box  
3047, Seul, Sud-Koreio.

## DONACOJ

Claes Göran Ingestedt, Vällingby 100.  
Anonima 100. **Je memoro de Folke  
Nilsson:** Sigrid & Hilding Evstedt,  
Gnesta 400. Sven & Edit Johansson,  
Laholm 200. Kerstin, Ingvar, Ingrid &  
Bengt, Kvibille 150. **Klubo Cent:** Olle  
Olsson, Lund 100. **Klubo Mil:** La  
ĝisnunaj membroj: N-ro 1: Sven Møl-  
lestad, Helsingborg. 1000. N-ro 2:  
Britta och Arne Andersson, Halmstad  
1000. N-ro 3: Bertil Bengtsson, Halls-  
berg 1000. N-ro 4: Jan Milld, Västerha-  
ninge 1000. N-ro 5: Helsingborgs  
esperantoförening 1000. N-ro 6: Gösta  
Hedling, Uppsala 1000. N-ro 7: Karl  
Rönnerberg, Västerfärnebo 1000. N-ro 8:  
Sixten Green, Helsingborg 1000.

**Aŭtomata enpago:** Leif Nordenstorm,  
Boden, ĉiumonate 75.

Novaj donacoj bonvenaj al poŝtgiro  
20 12-3 (Svenska esperantoförbundet).



# La 77-a UK en Vieno

La ĉi-jara kongresejo estis granda. Fakte la internacia konferenca centro de Vieno estis tiom granda, ke ĝi eĉ havis sian propran metrohaltejon transflanke de la Danubo. La unuan tagon iuj kongreson-troj elektis la malĝustan elirejon kaj trovis sin antaŭ impona sed senviva konstruaĵego. Konsterno! Ĉu nuligita la kongreso?! Poste, trovinte la ĝustan alon de la komplekso, ili survoje aŭdis iun informitulon klarigi al la redaktoro de revuo *Esperanto*: "Nu, UEA volis kongreson en Vieno kaj ili ja havos sian deficiton."

Nur malgranda ŝildeto anoncis la kongreson de ekstere. Sed interne en la vasta vestiblo jam formike svarmis kongresanoj kaj super iliaj kapoj la ampolaro de grandega lumtabulo formis pompan mesaĝon de bonvenigo al la 77-a UK. Fine de la semajno eblis konstati, ke la viena kongreso per 3033 aliĝintoj fariĝis la ĝis nun plej granda UK okazinta en la "okcidenta" mondo, almenaŭ post la dua mondmilito.

Dum la semajno certe neniu simpla kongresano havis kaŭzon plendi pri la kongresejo. (Krom eble pro manko de sidlokoj en la centra vestibla placo.) Male, ĉiuj salonoj kaj kunvenejoj estis komfortaj kaj adekvate (eĉ lukse) ekipitaj. Ĉiuj ĝiĉetaj servoj, ĉu provizitaj de esperantistoj aŭ de la kongrescentraj dungitoj,

estis plenumitaj efike kaj afable. Dank' al bone funkcia klimato, ĉiuj povis forgesi pri la forceje humida varmego, kiu eksterdome dum la tuta semajno minacis per tuja insolacio.

Sed aliflanke la supre citita aludo pri deficiito koncernis precipe la astronomiajn kostojn de ĝuste la konferenca centro. Estas konate, ke UEA sufiĉe malfrue devis rezigni pri la planita UK en Prago kaj decidis anstataŭe realigi ĝin en la proksima Vieno. Konsiderante la antaŭvideble multnombrian partoprenantaron, la limigitajn surlokajn homfortojn kaj la malmultan tempon por preparoj, oni facile komprenas, ke ne estis facile marĉandi pri kongresejoj.

Alia malhelpa faktoro estis, ke pli ol duono de la kongresanaro per siaj kotizoj ne plene kovris eĉ siajn proprajn kostojn. Pro la ŝanĝoj en la antaŭe socialismaj landoj, granda nombro da tieaj esperantistoj nun povis veni al la kongreso kaj partoprenis ĝin kontraŭ rabatita kotizo. Montrigis poste dum la semajno, ke gvidaj UEA-funkciuloj fakte vidas seriozan problemon en la tendenco de ĉiam pli grandaj kongresoj. (Pli pri tio poste.)

Eble estis pro la menciitaj malfacilaĵoj, ke la kongreso kiel tuto ĉe almenaŭ iuj kongresanoj postlasis impreson de ia nedifinebla senverveco kaj manko de inspi-

ro, de formala postulplenumo, sed malmulto pli.

## Distraj programeroj

Ni ne detale listigos la programerojn, ĉar niaj raportistoj ne ĉiujn ĉeestis. Kiel ĝenerala impresio direblas, ke la distraj kaj ĝeneralaj programoj ŝajnis iom stampitaj de la pli ol kutima modesteco de disponeblaj rimedoj.

Tute apartan mencion tamen meritas la kabaredaĵo de "F-ino Barlaston". Jam la mistifika anonco en la kongreslibra programo ekscitis gajan scivolemon, kaj certe neniu spektanto seniluziigis. La eble ne ĝismedole ina sed des pli verva super-fraŭlino amuzis la internacian publikon per aŭtentike brita burleskaĵo laŭ "muzik-hala" tradicio. Ŝia suverena rego de la salono, lerta ekvibrado inter kruĉo kaj subtilo kaj virtuoze "personaj" interpretoj de pli-malpli konataj kantaĵoj el la repertuaroj opera (*Tosca*, *Madame Butterfly*), opereta (*La Mikado*) aŭ muzikala (*My Fair Lady*) plene ekstazigis la publikon kaj la aplaŭdaj bisoj tondris fojon post fojo. Estas certe, ke neniu volos maltrafi ŝian sekvan recitalon.

Ankaŭ la granda teatraĵo de la kongreso, la klasika komedio *La gastejstrino* de Carlo Goldoni, estis lerte kaj kompetente prezentita de Bulgaro Esperanto-Teatro kaj ricevis favoran akcepton de la publiko.

## Belartaj konkursoj

En la prestiĝaj konkursoj ĉi-jare bone sukcesis tri svedianoj. En la proza branĉo la unuan lokon gajnis Sten Johansson per la rakonto *Biciklo de eterno* kaj la trian lokon Elsbeth Eriksson per *La neĝolavango*, dum la gotenburĝano Aira Kankunen fariĝis la "Nova Talento" de 1992 per la poemoj *Kaj la merlo kantis*, *Karesu singarde la haŭton kaj Tiliovicoj rektaj*. Ĉu Aira sekvos en la spuroj de la pasintajara Nova Talento, la portugalo Gonçalo Neves, kiu ĉi-jare gajnis la duan kaj trian lokon en la poezia branĉo (la unua ne estis aljuĝita) kaj krome la duan lokon en la proza branĉo? Kromaj premiitoj estis la hungaro István Ertl, kiu dividis la trian poezian lokon, kaj Jan Werner el Ĉeĥoslovakio, kiu verkis la premiiatan eseon *Ĉu konflikto inter vorto kaj nocio?*



La kongresa ĝiĉeto pri Monda Kunagado kaj pri Amik' en Afrik'. Deĵorantoj estas Märtha Andréasson kaj Mark Fettes.





*Vigla dancorkestro kaj bela salonego kreis inde gajan etoson dum la balo.*

### **Komitato**

Tiu ĉi estis jaro de elektoj. La komitatanoj kunvenantaj en Vieno estis do aŭ ĵus reelektitaj aŭ novelektitaj de siaj respektivaj landaj asocioj (A-komitatanoj) aŭ per poŝta voĉdono de la individuaj UEA-membroj (B-komitatanoj). Surloke la A- kaj B-komitatanoj elektis ankoraŭ nombron de kompetentaj esperantistoj kiel C-komitatanojn.

Koncerne la okazintan elekton de la B-komitatanoj aŭdiĝis plendoj, ke pro malrapide funkcia ekspedado flanke de UEA, multaj ekster-eŭropaj individuaj membroj ricevis la materialon tro malfrue por vere povi partopreni la poŝtan voĉdonadon. La UEA-respondeculoj koncedis, ke oni jes pro ekonomiaj kialoj nuntempe uzas pli malrapidan manieron dissendi la gazeton ktp., sed cetere simple neis, ke tio estus fuŝinta la elektojn. Do unu aserto kontraŭstaris la alian. Simila kritiko revenis poste, kiam estis tempo trakti la estraran raporton, kiu ja ĉiam estas dissendata kiel unu numero de revuo *Esperanto*. Ĉar la plejmulto el la komitatanoj unuafoje vidis ĝin nur ĉ. dek minutojn antaŭ la koncerna kunsido, aŭdiĝis pluraj petoj prokrasti la traktadon de la jarraporto al pli posta kunsido. Tion la prezidanto pro neevidentaj kaŭzoj rifuzis. (Nekutima por svedoj estas la aranĝo, ke la prezidanto de la estraro prezidas ankaŭ la assemblean traktadon de la propra raporto...)

Unu el la aferoj en la jarraporto vekantaj diskuton, estis la iom provoka aserto, ke la esperanto-movado, kiu en Eŭropo antaŭe avangardis rilate kunla-

boron trans la politika disblokiĝo, en la nuna novaspekta Eŭropo perdis la elanon kaj ke precipe la okcidentaj landaj asocioj ne sufiĉe kaptas la okazon helpi al la orientaj movadoj. Kvankam i.a. la germanoj surbaze de siaj lastatempaj agadoj povis citi plurajn refutojn al tia kritiko, restas fakto, ke tio ĉi estas unu el la seriozaj problemoj alfrontantaj la esperanto-movadon. La movadoj en la siatempaj socialismaj landoj, kiuj dum longa tempo formis grandegan parton de la kvanta kaj kvalita bazo de la esperantokomunumo kiel tuto, nun baraktas en krizo. Estas grave por ni ĉiuj, ke laŭeble multe de la iamaj atingoj saviĝu kaj pluvivu.


La tumultaj okazaĵoj en Eŭropo starigis aliajn urĝajn problemojn antaŭ la komitato. Plej ekscititan disputadon kaŭzis la demando pri la eksjugoslaviaj landaj asocioj. Antaŭ la disfalo de Jugoslavio, la diversrespublikaj asocioj alligiĝis al UEA pere de unu tegmenta tutjugoslavia asocio. Nun la organizoj de Kroatio kaj Slovenio petis aliĝon kiel landaj asocioj de UEA. Ke la antaŭa tutjugoslavia asocio ne plu reprezentis ion ajn, pri tio la komitato ne hezitis. La problemojn kaŭzis la surpriza propono de la laborgrupo preparinta la demandon, ke la komitato sen pluaj formalaj akceptoj kiel landajn asociojn ne nur la du, kiuj sendis formalan peton, sed *ĉiujn* el la eksjugoslaviaj asocioj. Multaj objektis, prave, ke tia decido estus evidente kontraŭstatuta. La propono tamen estis fine akceptita, post drama kaj brua debato, sed kun multaj

sindetenantoj.

Multajn demandojn la komitato pri-traktas aŭ preparas ne en pleno, sed en pli malgrandaj laborgrupoj. Krom la supre preparolita laborgrupo pri novaj landaj asocioj, menciindas la grupoj pri:

**Financoj:** Tiu ĉi laborgrupo proponis duonigi la UK-kotizajn rabatojn, kiuj ĝis nun validis por aliĝantoj el netranspajpovaj landoj. Tiu propono cetere originis en la estraro. La kaŭzoj cititaj estis pragmataj; la grandnombraj kongresoj kun amasa parto de rabatitaj aliĝintoj fariĝas tro kostaj por UEA. Ekzemple en la venontjara kongresurbo Valencio la urbestro proponis senkoston kongresejon, sed ĝi havas kapaciton de nur 1.800 homoj. Se aliĝos pli, UEA devos mem pagi pli grandan, multekostan kongresejon. Ankaŭ tiu ĉi propono vekis protestojn en la pleno. Ĉu estas juste, ke la provoj limigi la partoprenantaron trafu precipe la esperantistojn el orientaj landoj? Tio ankoraŭ pli malfaciligus por multaj seriozaj sed malriĉaj samideanoj. Aliaj komitatanoj volis vidi en laŭeble plej grandnombraj kongresoj valoron en si mem. Al tiaj objektoj la prezidanto senpacience respondis, ke interesiĝantoj pri la demando devintus partopreni la koncernan laborgrupon, kaj ke tempo ne troviĝas por pluaj diskutoj. La fina decido estis provi la pli altajn kotizojn por la du venontaj UK-oj.

**Kongresoj:** Tie ĉi okazis principa diskuto pri la formo kaj aspekto de la Universalaj Kongresoj. Luj plendas, ke ili sek-



*Kiel kutime la Internacia Kongresa Universitato proponis interesajn prelegojn. Sur la bildo Franz Georg Rössler parolas pri la dua viena skolo de muzika komponado*



vas la saman modelon jaron post jaro. ("La kongresa programo de la UK en 1908 estis principe identa kun la ĉi-jara!") Aliaj atentigas pri la izoliteco, fermiteco. ("Ĉu la homoj en Vieno scias, ke okazas kongreso?") Ankorau aliaj opinias, ke oni tro malmulte atentigas la unuafojajn kongresanojn, kiuj spertas malfacilaĵojn ekkoni novajn homojn en la relativa anonimeco de la grandaj kongresoj. La komitato konstatis, ke la demandoj estas tre malnovaj, ke multaj jam provis enkonduki ŝanĝojn, sed ke malmulto okazis. Parto de la problemo estas, ke multaj havas ideojn pri ŝanĝoj, sed troviĝas almenaŭ same multaj, kiuj volas ŝanĝi nenion.

**Fakaj asocioj:** Oni konstatis, ke estas grandegaj diferencoj inter diversaj fakaj asocioj. Iuj funkcias bonege kaj faras valoran laboron, aliaj apenaŭ eĉ vegetas. Troviĝas reguloj, sed multaj FA-oj ne konformas al ili. Venis plendoj de esperantistoj, kiuj ne ricevis respondon de siaj FA-oj. Oni proponis pli striktajn kaj pli strikte aplikotajn regulojn. La komitato trovis, ke necesas atente sekvi la fakajn asociojn kaj postuli regulajn raportojn pri la farita laboro.

**Generaciaj demandoj de la esperanto-movado:** La iom nespecifica titolo de la laborgrupo trompis almenaŭ kelkajn el la pli junaj komitatanoj. Montriĝis nome, ke oni tute ne diskutas demandojn tuŝantajn ekz. TEJO-n kaj la junularan movadon, sed la problemojn de geesperantistaj paroj, kiuj volas pludoni esperanton al siaj infanoj.

**Lingva strategio de UEA:** La celo de la laborgrupo restis iom neklara, sed oni vigle diskutis pri i.a.: Ĉu UEA entute estas lingva instanco? Ĉu estas dezirinde, ke ĝi kiel organizo (ekz. en sia oficiala organo) kontestu starpunktojn de la Akademio? Ĉu la Akademio entute meritas atenton nuntempe? Ĉu UEA iniciatu eldonon de nova vortaro, konkuranta kun PIV? Ĉu UEA starigu internan referencgrupon pri lingvaj demandoj? Montriĝis, kiel ĉiam koncerne lingvajn aferojn, ke grupo da esperantistoj malfacile konsentas pri io ajn.


### Nova estraro

Kiel prezidanto de UEA por la venontaj tri jaroj reelektiĝis John Wells. La cetero de la nova estraro konsistas el Ulrich Lins, Mark Fettes, Ian Jackson, Hans Bakker, So Gilsu kaj Michela Lipari.

Per Aarne Fritzon  
Roland Lindblom

## Niaj aktivuloj

# 12-jara redaktoro



Jarlo Martel-Monto (maldekstre) prezentas sian poezion per recitado, montrado kaj tamtama ritmo dum la unua Kultura Esperanto-Festivalo en Upsalo 1986.

Jarlo Martel-Monto (Jarl Hammarberg) estas poeto sveda kaj esperanta. Li eldonis du poemarojn en Esperanto: *AJN* (1983) kaj *ike ize ive* (1991). Liaj verkoj estas nesimilaj al aliaj, kaj pro tio kelkaj homoj ne bone komprenis tion, kion li skribis kaj komponis. En tiu kazo tiu ĉi intervjuo eble helpas kompreni lin.

"Mi volas forĵeti frazojn el la poemo", jen lia propra deklaro, kaj tio ŝajnas esti la baza fundamento. Supozeble lia vojo kiel verkisto komenciĝis jam en la junaĝo, kiam li 12-jara redaktis la infangazeton *Maskerad Drake 1952* (Maskita drako 1952).

**Boo Mee:** Jarlo, vi eldonis du malsimilajn kaj nekutimajn poemarojn en Esperanto. Kia diferenco estas inter tiuj du libroj? Kio karakterizas ilin?

**Jarlo:** *AJN* estas facile kunigebla al aliaj poemoj, ĉar ĝi enhavas frazojn. *AJN* montras unu el miaj streboj en la evoluo de poemarto. Unua paŝo estis priskribi mondon kaj ĉirkaŭaĵon, poste venis al mi inspiro forlasi la tradicion, por la senfrazo poemo. Vorto estas io alia ol bildo. Pentristoj ŝtupe liberigis el la reala situacio. Nun mi ne plu volas priskribi sed

nur skribi, ĉar skribi estas pli rekte ol priskribi. *Ike ize ive* konsistas el du partoj: poemo kaj bildo. Ĝi estas plua paŝo post *AJN* kaj unua provo de de senfrazo poemo kun ritmo kaj kontrasto.

**B:** Ĉu vi opinias, ke per bildoj eblas esprimi sin pli facile ol per vortoj?

**J:** Jes, jam mi rimarkis, ke oni facile komprenas bildojn. Eble ne estas poemo se ne estas frazoj, sed mi volas havi revolucion. Mi daŭrigos mian strebadon en pli evoluigita maniero. En skribita formo la sono de la vorto estas kaŝita, sed sur scenejo aperas kaj vivas la sono, kiam oni laŭlegas la poemojn kun muziko kaj samtempe montras kolorajn bildojn. Mi jam eksperimentis pri tio, kaj tiu eksperimento ĉe junuloj estigis pozitivan reagon, kio stimulis min. En la formo de scenpoemo mi vidas grandan eblecon senfrazigi. Antaŭe mi verkis diversmaniere, nun mi trovis ĝustan vojon, eĉ se tia verkado postulas pli fortan kaj profundan koncentrigon ol antaŭe.

**B:** Kian laborsistemon vi havas por verki tian poemon?

**J:** Unue mi kolektas materialon el diversaj ĵurnaloj kaj gazetoj. Kiam registr-



iĝis sufiĉe da materialo, mi elektas vortojn el tiu listo kaj komponas. Antaŭ unu semajno mi ekzemple kolektis "sen"-vortojn kiel "senhalte" kaj "senhaste" el *Monato*. Estis interesa laboro.

**B:** Ĉu la vortoj elektitaj de vi havas interrilatojn kaj kunligitajn signifojn?

**J:** Jes, certe ili havas. Kaj mi kombinas vortklasojn alimaniere kaj kontraste: adverbo kaj substantivo. Kontrasto estas baza principo. La frazarango ne estas utila en miaj poemoj, ĉar mia vojo estas alia. Surbaze de miaj spertoj mi verkas karakterizajn poemojn. Mi konstruas lozajn vortpecojn kaj aliaj homoj rajtas rekonstrui ilin laŭplaĉe. Mia intenco estas rompi fraz-sistemon, ĉar vortoj mem havas riĉajn signifojn. La formoj aŭ la aspektoj de vortoj kaj la fonetiko kiel ritmo estas gravaj. Ĉiuj vortoj havas rilaton kun mi kaj ili havas emocipurigan funkcion en mia vivo.

**B:** Ĉu vi jam antaŭ longe havis tian ideon aŭ ĉu vi ricevis inspiron de iu? Kio aŭ kiu influis vin?

**J:** Antaŭ longe... Mi neniam pensis pri tio. Tamen estas influoj, unue de modernistoj. Modernisma esprimmaniero similas al la mia. Due, de multaj aliaj en dadaismo kaj surrealismo, ĉar ili riĉigas miajn sentojn kaj ideojn.

**B:** Ĉu vi pensas, ke viaj verkoj apartenas al la surrealismo?

**J:** Jes, aparte. Surrealismo estas iamaniere unu paŝo antaŭen aŭ malantaŭen. La surrealismo estis nefigura, sed ĝi donis novajn ideojn al la modernismo, pli da evoluo, ĉar mi forĵetis tradician formon. Miaj verkoj estas unu parto de la strebo evolui novan poemformon.

**B:** Kion pri novaj planoj? Ĉu vi daŭre verkos en Esperanto?

**J:** Nun mi okupiĝas pri nova projekto svedlingva. Post tio mi denove povos daŭrigi en Esperanto.

**B:** Ĉu vi jam en via infanaĝo havis interesecon por poemoj?

**J:** Ne... Mi ne scias.

**B:** Ĉu vi povas malkaŝi kelkajn impresplenajn memoraĵojn el via infanaĝo?

**J:** Mi ne havas tiajn memoraĵojn, sed mi pensas, ke mia infanaĝo estas iamaniere proksima al la nuno. Kiam mi estis knabo, mi laboris pri diversaj projektoj. Poste mi rimarkis, ke tiamaj ideoj ligiĝas al nunaj ideoj. Jam de tiam modernismo fariĝis granda intereso por mi.

**B:** Kion vi plej ŝatis en la lernejo?

**J:** Hm... Mi ne povas respondi al tio. Mi ne ŝatis la tiaman lernejan sistemon kaj lasis la lernejon. Tamen poste mi revenis kaj ekokupiĝis pri infangazeto. Kiel

# Internacia gimnazio



En Bratislavo, la ĉefurbo de baldaŭ memstara Slovakio, okazis la semajnon post la Universala Kongreso la ĉiujara internacia konferenco de ILEI. En ĝia kadro okazis ankaŭ eksperimenta internacia gimnazio. Gimnazianoj 13- ĝis 16-jaraj dum preskaŭ tuta semajno ricevis lecionojn en esperanto pri temoj tiel malsimilaj kiel matematiko, geografio, literaturo de esperanto, muziko. La partoprenantoj venis el malsamaj landoj, tiel ke la klaso vere estis internacia. Ne ĉiuj gimnazianoj estas sur ĉi tiu foto kun Bratislavo en la fono.

12-jara knabo mi redaktis la infangazeton *Maskerad Drake*, 1952 kune kun mia instruisto. Kelkaj porinfanaj verkistoj kontribuis al la gazeto, i.a. Astrid Lindgren. La unua volumo estis tute mane farita kaj ĝi ne estis bona, tamen iom post iom ĝi pliboniĝis. Ĉion mi mem deŝignis kaj pentris.

**B:** Aha... Ĉu oni povas diri, ke tiu kapablo de 12-jara knabo finfine trovis la bild-kaj scenpoemon?

**J:** Eble jes.

**B:** Antaŭ longe vi eldonis tri librojn kune kun via unua edzino Sonja Åkesson en la sveda. Ĉu vi volas diri kelkajn vortojn pri tiuj libroj?

**J:** Estas malfacile resumi... La ideo "kune verki" estis mia, kiam ŝi estis en kriza situacio. Kiam ni komencis labori, ni estis forte kaptitaj de tiu amuzega kunverkado. Tio estis vera aventuro. Ni

profunde komprenis unu la alian kaj ŝi solvis diversajn problemojn, kaj ŝi... Ŝi admiris min. Jes, ŝi havis specialan signifon por mi.

**Boo Mee Lindblom**

## Verkoj de Jarlo Martel-Monto (Jarl Hammarberg):

*En la sveda:*

Bord, duka er! 1964

JA JA JA JA JA JA JA JA JA 1966

Järnvägar järnpiller järnplåtar 1968

Brev från Jarlo 1970

*Kun Sonja Åkesson:*

Strålande dikter/Nej så fan heller 1967

Kändis, diktberättelse 1969

Hå! vi är på väg 1971

*En Esperanto:*

AJN 1983

ike ize ive 1991

# A J N

La grandformata libro de Jarlo Martel-Monto estas havebla en la EsperantoCentro en Stokholmo. Telefonu pri detaloj!



# La unua tutlanda renkontiĝo en Tanzanio

TANZANIO

Nun ĝi okazis, la unua tutlanda renkontiĝo en Tanzanio. Ideo naskita jam en 1988, kiam Jan Setréus kaj mi rondvojaĝis tie. Poste proponita por Tabora kaj por Bunda, nun dum semajno en julio realigita en Dar-es-Salaam. Tanganjika Esperanto-Asocio fariĝis Tanzania Esperanto-Asocio (TEA) kaj plenkunsido konfirmis novan statuton por la asocio kaj elektis ĝian estraron.

Dum la unuaj tagoj de julio kolektiĝis reprezentantoj de la kluboj, ne de ĉiuj, sed de la plej multaj. Entute dudeko da personoj partoprenis. Aliĝitaj eksterlandaj partoprenantoj estis mi kaj mia amikino Eva, kaj surprizo: alvenis Nino Vesella de Italio, kiu skribis la unuan lernolibron en la svahila en 1975 kaj instruis al multaj tanzanianoj. Li partoprenis i.a. la inaŭguron survoje al amikoj por praktiki sian svahilan. Alia surprizo por la partoprenintoj estis la vizito de Horst Gruner el Germanio, kiu en januaro 1993 translokiĝos al Dar-es-Salaam por tri-jara servado ĉe la germana ambasado.

Manipulado per la asocia kaso kaŭzis diskutojn kaj proponon eĉ prokrasti la tutan renkontiĝon, sed ni trovis portempan solvon de tio.

La distriktestro de Dar-es-Salaam partoprenis la inaŭguron kaj esprimis apogon al la Asocio en sia parolado. Salutoj kaj donacoj estis transdonitaj. De Sveda Esperanto-Federacio (SEF) granda kvanto da libroj, de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU) T-ĉemizoj, de Eldona Societo ĉapeloj kaj tajpilo al TEA, kaj de kelkaj svedaj kluboj donacoj kaj salutoj al TEA kaj al la tanzaniaj ĝemelaj kluboj. De Hans Bakker, komisiito de Universala Esperanto-Asocio (UEA) por Afriko, venis salutoj kaj bondeziroj al la renkontiĝo. Ĉeestis ankaŭ s-ro Sadallah, membro de la klubo Tanganjika Esperanto-Asocio antaŭ 25 jaroj, kiu multe kunhelpis por oficialigi TEA-n dum 1991, sed kiu ne plu parolas esperanton.

Kun flavaj ĉapeloj kun la vorto ESPERANTO kaj blankaj T-ĉemizoj, la partoprenantoj estis facile rekoneblaj inter la restantaj studentoj kaj dungitoj de Ardhi Institute, kie la renkontiĝo okazis

dum la ferio. Ardhi Institute situas ekster Dar-es-Salaam sur deklivo ĉe la universitato. Ni loĝis en unultaj studentĉambroj kun la restoracio proksime kaj mallonga promeno por atingi la salonojn.

Dum la semajno okazis pluraj renkontiĝoj por diskuti statuton, eĉ ĝis noktomezo. En la kurso por komencantoj partoprenis Clement Mang'anya kaj Eva. Ĉu ŝi estas la nura eŭropano kun tia sperto en Afriko? Progresintoj studis por pliboniĝi. Vesperaj prezentadoj kun kantoj, poemoj, rakontoj kaj etaj konkursoj gvidataj de Matabaro Guillen, Mramba Simba kaj Costantine Mashauri estis akompanataj de kelkaj ranoj ekstere kun impona voĉa forto.

Plurtempe la diskuto revenis al ekonomio kaj la financado de kluba aktiveco. Multaj membroj estas studentoj aŭ sen laboro kaj la membrokotizoj estas malaltaj. Afrika Agado de UEA subtenas la kluban laboron, sed la kluboj serĉas rimedojn por sendependa vivo. Inter tiuj ideoj estas i.a. servado de trinkaĵoj kaj fotado. Per fotilo eblas havigi bonan enspezon en vilaĝoj kaj malgrandaj urboj. Ne multaj posedas fotilon, sed ofte oni volas foti iun familian eventon aŭ simile.

Vendrede estis grava kunsido por trakti la finan proponon pri statuto kaj konfirmi ĝin. La nova statuto enhavas detalan regularon pri elektoj de funkcioj. Sabate matene okazis la unua laŭstatuta jarkunsido kun elektoj. Alia grava punkto estis la ekonomio de TEA. Oni decidis pri 2 000 TZS (tanzaniaj ŝilingoj, ĉ. 32 SEK) kiel kontribuajo de ĉiu klubo. Ĉiuj ankaŭ subtenis la laboron por havigi sidejon en Dar-es-Salaam. Ambaŭ tiuj kunsidoj estis gvidataj de Kilima Lambert Tambwe el Matumaini E.-klubo, kiu brile faris sian laboron.

Jen la novelektita estraro de TEA:

<i>prezidanto</i>	Mramba Simba
<i>sekretario</i>	Costantine Mashauri
<i>kasisto</i>	Charles K Hiza
<i>estrarano</i>	Kilima Lambert Tambwe
<i>estrarano</i>	Clemant Mang'anya

Hiza kaj Mang'anya estas elektitaj por unu jaro, la aliaj por du jaroj. Kiel revizoroj estas elektitaj Bilimba Mateso, Dar-es-Salaam kaj Nyabanga Chirimi, Urambo. Elektoprepara komitato por la venontjaraj elektoj estas Dieudonné Kenge el Kigwa, Maswi Sosthenes el Dar-es-Salaam kaj Jayrousy Eliakimu el Mwanza.

La ministro pri edukado devis, pro longigo de la laboro kun la ŝtata buĝeto, sendi reprezentanton por ĉeesti dum la fermo de la renkontiĝo. Vespere oni prezentis la renkontiĝon en la landa novaĵelsendo de la radio.

La grupo, kiu preparis la renkontiĝon konsistis el Costantine Mashauri, Maswi Sosthenes, Nyampiga Njerembe, Clement Mang'anya kaj Israel Kumbo. Ili meritas dankon pro siaj kontribuajoj al la sukceso de la renkontiĝo. Specialan dankon al Costantine, "la spino de esperanto en Tanzanio" laŭ komuna amiko.

Ĉu vi, amiko, havas neuzatan fotilon por donaci al tanzania klubo? Ĉu vi pretas kontribui mone por havigi fotilojn aŭ por realigi Esperanto-centron en Dar-es-Salaam? Ĉu vi pretas korespondi kun juna tanzaniano por helpi progresigi lian aŭ ŝian lingvokapablon? Ĉu via klubo volas aliĝi al la sved-tanzania ĝemelaro? Kontaktu SEF, Esperanto-Centro, Brunns-gatan 21, 111 38 STOCKHOLM, tel 08-11 74 34, aŭ rekte kun Anita Dagmarsdotter, Mariehamns-gatan 18, 164 79 KISTA, tel 08-751 73 79 (hejme). Mondonaco kompreneble ankaŭ estas bonvena al la konto de SEF.

90-minutan sonbendon de la renkontiĝo kun svahila parolado dum la malfermo, anglalingva parolo de s-ro Sadallah kaj diversaj prezentadoj kaj intervjuo en esperanto estas mendebla ĉe Anita Dagmarsdotter, poŝtĝirkonto 449 48 91-7, por 50 kronoj.

Anita Dagmarsdotter



# Paroli kun gazetaro: Konsiloj por informado

Antaŭrimarko: Ĉi tiuj konsiloj ĉefe validas por la plej oftaj okazoj de kontaktoj inter esperantistoj kaj ĵurnalistoj, nome sur loka (urba, regiona) nivelo. Kun modifoj ili tamen estas aplikeblaj ankaŭ por aliaj niveloj (ekz. faka revuo, tutlanda gazeto, inform-agentejo k.s.).

## 1. Mankas intereso pri Esperanto

Konsciu, ke ĵurnalistoj – same kiel la ĝenerala publiko – scias preskaŭ nenion kaj ankaŭ ne havas intereson pri Esperanto. En multaj landoj, precipe okcidentaj, la homoj opinias, ke la lingvoproblemo estas solvita per la disvastigo de la angla lingvo. Ĵurnalistoj kutime scias ĉi tiun lingvon kaj aplikas (devas uzi) ĝin en sia profesio. Krome konsciu, ke helpe de gazetoj vi ne povas konvinki homojn pri la valoro de Esperanto: el ĉiuj studoj pri akceptemo de legantoj oni scias, ke ili akceptas argumentojn nur, se tiuj konfirmas iliajn jamajn konvinkojn, opiniojn, sintenojn ktp.

## 2. La limigita celo de informado helpe de la gazetaro

El punkto 1. sekvas, ke per informado pri Esperanto en gazetoj ni maksimume povas vekti la intereson de latentaj simpatiantoj. Tamen, laŭ la ĝenerala sperto, ties nombro estas sufiĉe granda. Do valoras la penon helpe de la gazetaro ne nur vekti ilian intereson sed ankaŭ vivteni ĝin, ĉar el simpatiantoj estiĝas foje adeptoj. Tial necesas konstanta informado pri Esperanto – kun tiu ĉi limigita celo.

## 3. Persona kontakto kun ĵurnalistoj

Por sukcesi ĉe redakcioj estas grave havi personan kontakton al la respondeca redaktoro almenaŭ unu fojon. Do vizitu la redakcion kaj prezentu vin al la ĵurnalistoj. Kunportu informan materialon (ne tro multan) kaj sobre klarigu, kio estas Esperanto (se li tute ne scias); respondu trankvile liajn demandojn, eĉ se ili estas plej stultaj (en viaj oreloj). Informu lin pri via klubo kaj invitu lin al vizito, atentigu lin pri temoj taŭgaj por raporto aŭ intervjuo. Demandu pri teknikaj aferoj (al kiu sendi manuskriptojn, kiun alvoki telefone ktp.).

## 4. Raportoj kaj manuskriptoj

Se temas pri grava programero en la vivo de via klubo, estas konsilinde verki koncizan antaŭ-raporton ĉ. unu semajnon anticipe; indiku precize daton, lokon, temon ktp., por ke potencialaj interesitoj povu veni. Eventuale pensu ankaŭ pri pagita anonco.

La plej ofta formo de informado estas raportoj pri okazintaj eventoj. Gravus, ke vi ne atendu tro longe antaŭ ol verki manuskripton: faru tuj la saman aŭ postan tagon kaj transdonu/sendu ĝin senprokraste. Ne pre liveru manuskripton tajpitan laŭ ĵurnalismaj reguloj (vidu pri tio en *Manlibro pri ĵurnalismo*).

Se temas pri evento en la ĝenerala E-movado ekster via urbo (ekz. UK), tio kutime ne interesas lokan ĵurnalon. Ta-

men, se vi lerte enplektas lokan rilaton, vi povas tamen lanĉi raporton eĉ pri UK en loka ĵurnalo.

## 5. Gazetara konferenco, intervjuo

Tiuj ĉi metodoj por informi la publikon pri Esperanto helpe de ĵurnalistoj devas esti ligitaj al tute konkretaj gravaj aferoj kaj eventoj. Aranĝi gazetaran konferencon indas nur en granda urbo kun pluraj redakcioj gazetaj, radiofoniaj kaj televidaj. Inviti al intervjuo tamen eblas ankaŭ okaze de pli ordinaraj aferoj kaj temoj; sed gravas, ke la intervjuato estu lerta homo, kiu ne falas en la kaptilojn de ĵurnalistoj.

**Stefan Maul**

(el revuo *Influo*, junio 1992, laŭ preleĝo farita dum UEA-seminario pri informado en la slovaka urbo Proprad ĉi-printempe.)

Lokaj kaj regionaj radiostacioj estas idealaj por penetri. Ili ofte havas problemojn pri plenigo de la elsendotempo. Oni pensu ekz. pri intervjuoj kaj konversacioj okaze de nekutima evento, kiel vizito de gasto el ekzotika lando aŭ kongreso ktp. Radiostacioj nepre volas raportojn pli frue ol la gazetoj, do antaŭ aŭ dum iu evento, neniam poste. Se oni sendas informon pri iu evento, oni ankaŭ aldonu telefonnumeron, kie eblas kontakti la organizantojn dum la evento. Oni anticipe ekzercu sin, precipe pri konciza respondado sen antaŭpreparo. Ideale estas ilustrati intervjuon per bonkvalita muziko en Esperanto.

**Thomas Bormann**

(radioĵurnalistoj)

Ni ofte prezentas Esperanton kiel la solvon de la lingvoproblemo, sed ĵurnalistoj konsideras ĝin kiel solvon de iuj esperantistoj por siaj problemoj. Ni prezentu kion ni kapablas solvi.

**Stefan Maul**

## UEA kolektas poŝtmarkojn

por vendi ilin. Tiamaniere UEA ĉiujare gajnas monon, kiun la organizaĵo uzas en la laboro por esperanto. Vi povas helpi al UEA:

- ĉiam uzante belajn poŝtmarkojn skribante al UEA, kaj
- sendante uzitajn poŝtmarkojn sur elŝiritaj leteranguloj al: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando



# Ankoraŭ pri komputiloj kaj supersignoj

En *La Espero* 3/1992, paĝoj 9-10, Franko Luin skribas pri la komputila traktado de supersignitaj literoj. Ĉar ekzistas pluraj metodoj trakti ilin, mi dezirus ion aldoni.

Mi uzas la kompostan sistemon T<sub>E</sub>X (oni prononcas [teĥ], kiel en teĥniko; temas pri la grekaj literoj τεχ). Per ĝi eblas komposti matematikajn tekstojn plej komplikajn. La problemoj de la esperantaj supersignoj estas nenio kompare al la simboloj necesaj por verki matematike.

La sistemo T<sub>E</sub>X estas elpensita de la usona matematikisto Donald Knuth. Ĝi nun estas kvazaŭ norma por ĉia matematika kompostado. Gvida ideo estas, ke oni uzas ordinarajn literojn por reprezenti matematikajn simbolojn, do ĉio estas tajpebla kaj videbla kiel ordinara teksto, kiun la komputilo nur post speciala ordono kompostas. Ekzemple la matematika simbolo por integro, do ∫, estas entajpebla kiel la sinsekvo `\int`. Ĉi tie la inversa tranĉostreko `\` estas simbolo indikanta, ke sekvas ia komando. Do neniel estas surprize, ke `\^` signifas "metu ĉapelon super la sekvantan literon". Por ekhavi ĉ oni do tajpas `\^c`. Same `\u` signifas "metu hoketon super la sekvantan literon", do `\uu` donas ŭ. simile `\vs` do-

nas ŝ. Sed kompreneble oni povas meti la supersignon sur iun ajn literon: `\a`, `\b`, `\c` same bone kiel `\A`, `\B`, `\C` aŭ `\a`, `\b`, `\u`; `\AA`, `\BB`, `\U`.

Se oni metas la ĉapelon sur `j`, oni ekhavas `\j`, kiu ja ne estas la esperanta litero `j`. Oni tial unue senpunktigas la literon kaj metas la ĉapelon sur la senpunktitan `j`, tajpante `\^j`.

Avantaĝo de tiu sistemo estas ke, se oni volas sendi tekston per komputilreta poŝto, oni uzas nur la sensupersignajn literojn, krom tiu inversa tranĉostreko (`\`). Do transsendo de tuta matematika dokumento en Esperanto, kun multaj simboloj kaj ĉiuspecaj literoj, estas tute normala kaj ĉiutaga afero.

Sed, kompreneble, vi povas objeti, ke oni devas tajpi tri simbolojn (`\^c`) por havi la solan literon `ĉ`. Tio ja postulas multan tajpadon por vorto kiel `\ja\uudo`. Fakte en la komenco mi tajpis tiel. Mi povas atesti, ke ne estas tre lacige. Sed estas tamen kompreneble pli bone havi unu klavon por unu litero, same kiel la sveda `\a` estas pli rapide tajpebla ol la sinsekvo `\^a`, kiu estas la T<sub>E</sub>X-metodo reprezenti ĝin.

Jen la punkto, kie menciindas alia programo, nome SMACS, per kiu eblas

